

la vivo“, en kiu la aŭtoro *Jürgen Neffe* detalas, kiel Darvino dum sia ĉirkaŭvelado de la mondo 1831 ĝis 1836 malkovris la fundamenton por siaj pioniraj novaj pensoj.



Bildo 1: Por la 200-a naskiĝdatreveno de *Charles Darwin* la brita poŝto eldonis specialajn poŝtmarkojn

Jam antaŭ tio Darvino malkovris ion tute alian, nome specialan formon de malrapideco. “Oni diris al mi“, legiĝas en lia vivopriskribo, “ke mi estis dum la lernado multe pli malrapida ol mia fratino Katarino“. Bonŝance la juna *Charles Robert*, naskiĝinta en la angla *Shrewsbury* la 12-an de februaro 1809, devenis el bonstata, liberala familio – kaj ankaŭ lia patro devis havi grandan indulgon al la posta studento. Sed la malrapideco de la juna Darvino kaj lia sencela lernado certe iel estis ligita kun lia emo sorbiĝi kaj revii en la propraj pensoj.

Tion rimarkis ankaŭ liaj profesoroj, kaj pro tio la botanikisto *John Steven Henslow* instigis la studenton, dungiĝi sur la mezurad-ŝipo “*Beagle*“, kiu 1831 ekveturis por plurjara esplorvojaĝo. En la sekvaj jaroj Darvino veladis tra la Magelan-markolo, travagadis la pampojn kaj montarojn de Sudameriko, esploris vulkanojn kaj koralinsulojn. Dum tio li kolektis kaj preparis tiom da preparitaj bestoj kaj plantoj, ke hejme tuta aro da esploristoj por jaroj estis okupita identigi la materialon.

La tutan amplekson de la vivo antaŭ siaj okuloj, Darvino rimarkis, ke la diversaj specioj estas distribuitaj laŭ karakteriza maniero. Sur la Galapago-insulo, tre malproksima antaŭ la marbordo de Sudameriko,

li kaptis kelkajn fringojn, kiuj tiom diferencis inter si kaj de siaj parencoj sur la firma tero, ke oni poste klasifikis ilin kiel memstaran specion. La plej revolucia penso de Darvino estis, ke la tiom granda speciomulteco ne povis esti la rezulto de ununura kreado, sed ke la diversaj specioj alkonformiĝis al sia medio kaj al novaj situacioj kaj vivokondiĉoj. Tion li nomis “natura bredoselektado“. Al Darvino estis klare, ke li per tiu teorio ŝokus ne nur la fakulan mondon sed precipe la diversajn ekleziojn, ĉar validis ja tiam aŭtoritate la biblia kreadhistorio. Pro tio li prokrastis la publikigon de sia jam en 1844 skizita teorio ĝis la jaro 1859, kaj kolektadis ĝis tiam faktojn – kaj, perletere, aliancantojn.

Tre amuze tion priskribas *Gould* en la supre menciita antaŭparolo por sia leteroelektaĵo, kiel la esploristo helpopete kaj penetre pri-demandis siajn kolegojn – kaj poste tion prezentis kiel kompletan amikaĵon. Se komence kelkuloj estis reagintaj iom ĉagrene pro tiu ĉi altrudiĝemo, poste tiuj leterricevantoj certe estis prudentaj rimarkigi, ke ili estis kvazaŭ kunlaborantoj ĉe la Darwinaj esploroj. La aventuro de la legado pri Darvino ankoraŭ nuntempe donas al ni la eblon partopreni en la interesa vivo de fama esploristo. (Fonto: *buchjournal* 4/2008)

Kontribue al la evolu-teorio kaj ĝiaj kritikantoj

Pro la libereco de la scienco!

Baze min, kiel pensantan homon, ne konvinkas la evolubiologio. Miaj ĉiutagaj vivospertoj estas la plej forta argumento por tio. Nenie mi malkovras blindajn hazardaĵojn laŭ geniece, planado aŭ kreiveco. En la arĥitekturo, la natursciencoj kaj la medicino oni povas konkludi, konsidere ordon kaj kompleksecon, pli facile certan inteligentan agadon ol hazardon.

La esenca problemaro ja estas, ke la evolubiologio estas same dogmeca kiel oni tion ĉiam riproĉas al ĝiaj fanatikaj malamikoj, la usonaj kreadismanoj. Ke Darvino antaŭ malpli ol 200 jaroj povis publike prezenti siajn tezojn pri la evoluado de la vivo, estas nur atribuebla al la libereco de la scienco.

Post la tempo de Galilejo la socio kaj scienco fariĝis pli malfermaj kaj allasis novajn ideojn. Sed la tempoj dume ŝajne draste ŝanĝiĝis al malbono – se hodiaŭ sciencistoj ne akceptas la darvinan teorion kiel absolutan veron, ili estas rigardataj kiel religie erarkondukitaj pseŭdobiologoj. *Charles Darwin* tiam ĝuis – kaj tute ne kontraŭbatalis – la liberecon de la scienco.